



Esperanto 80

Okdek-anoj Ĉe l' Papero

Nova eldono 2005 • n-ro 17a

La gazeto de la membroj de l' asocio Esperanto 80

Junio – Juin 2005

Le journal des membres de l'association Esperanto 80

Réunions conviviales!
Gastaj kunvenoj!

Réunion Conviviale – Gasta kunveno

N'oubliez pas de venir

à la réunion conviviale qui aura lieu :

Réunion incertaine, à décider avant vendredi.

À noter: la réunion conviviale suivante aura lieu à la rentrée 2005, en octobre... sauf si d'ici là l'association décide d'organiser quelque chose cet été. En tous cas, avant octobre, il y aura le rendez-vous annuel d'Agora.



Après Boulogne 2005 Post Bulonjo 2005

Salut!! Voici le numéro tant attendu sur Boulogne 2005. Il y a beaucoup de photos et j'ai dû faire un choix drastique... Mais le résultat ne me semble pas mauvais.

Choses importantes pour ce numéro, je vous propose un petit jeu par lequel vous ferez parler, râler ou jurer une de nos membres... à vous d'imaginer un texte et envoyez moi vos suggestions évidemment en espéranto. Vous trouverez aussi un petit article à paraître dans la SAGO sur le voyage de 3 de nos membres aux Pays-Bas. (en espéranto avec traduction en français).

Ensuite j'ai placé en page 3 bis pour ceux qui reçoivent le journal par internet le message de remerciements de Madis, qui fut parmi nous au mois de mars (voir pour plus de précisions le n°16). Enfin les brèves avec pas mal de choses importantes qui concernent notre association: une proposition de voyage à Soissons le dimanche 6 juin et un rappel pour la Transbaie 2005.

Cyrille

Saluton!! Jen la tiom atendata numero pri Bulonjo 2005. Estas multaj fotoj, kaj pro tio mi estis devigita fari drastan elekton inter ili... La elekto ne ŝajnas al mi malbona.

Gravaj aferoj en ĉi tiu numero, mi proponas al vi ludeton per kiu, vi paroligos, grumbligos aŭ sakrigos unu el niaj okdek-anoj... vi imagu vortojn kaj sendu al mi sugestojn kompreneble en Esperanto. Vi ankaŭ trovos artikoleton aperontan en la SAGO pri la vojaĝo de tri el niaj membroj en Nederlando (dulingva).

Poste mi aldonis trian kroman paĝon «3-a bis», kiun vi povos legi nur se vi ricevas la gzeton per la reto. Temas pri dank' mesaĝo de Madis, kiu estis inter du marto (vidu pri tion la 16an Okdek-anoj ĉe l' papero).

Fine, en Mallonge vi trovo multajn gravajn novaĵojn pri nia asocio: propono de vojaĝo perbusa al Sŭaso, dimanĉon la 6a de junio (t.e. tre baldaŭ), kaj rememoro pri la Tragolfetiro 2005.

Cyrille



Fotoraporto el Bulonjo ĉe Maro

Jen per nur kelkaj fotoj prezenteto de tiu renkontiĝo en Bulonjo 2005.

1 - La afiŝo de la renkontiĝo sur la pordo de la enirejo de la « Espace de la Faïencerie », bela kaj inda loko por nia kongreso.

2 - Dum simpozio organizita de UEA en la universitato « Littoral - Côte d'Opale ». Parolas Roland Breton, intervjuas Marc Bavant (dekstre), tradukas Brian Moon (nevidebla).

3 - Daniel malvarmumiganta en la kampadejo en Wimereux.

4 - Ankaŭ Luko plurfoje kun ni manĝis vespere en la kampadejo.

5 - Françoise Jaisson kaj Maryse dum manĝo en la manĝejo.

6 - Manĝejo estis fakte gimnastejo. Tiun ĉi fotadon Bernadette faris el la sidŝtuparo.

7 - Revenante el la Manĝejo, ni ĉiujfoje paŝadis dum pluraj minutoj por atingi la kongresejon.

8 - En la teatro municipa, en kiu okazis la unua UK. Ĝi estis tute plenŝtopita!!

9 - Bernadette, Maryse, Daniel kaj Jean-Claude: kvar okdek-anoj sidantaj en la seĝoj de la teatro.

10, 11 - Okdek-anoj kaj sesdek-anoj antaŭ la teatro de la urbo post oficialaj ceremonioj: Cyrille, Jean-Claude kaj Vincent.

12 - Parolado de Richard Valet antaŭ busto de Zamenhof. Sur tiu ĉi placo, staras stacidomo per kiu Zamenhof alvenis en Bulonjon.



En Anglio

13 – Ni iris al Anglio buse pere de la fama sub-Manika trajno. Post alveno en la landon, ni iris en hotelon, en kiu okazis paroladoj de la urbestro de Folkeston kun tradukoj de J. Wells. Sinjoro Wells estas fama brita esperantisto, prezidanto de la Brita E-asocio, eks-prezidanto de UEA kaj eminenta fakulo pri lingvistiko. Poste, ni drinkis kafon kaj teon en la hotelo kaj rapidis al la manĝejo.

14 – Post manĝo senfina, kaj ne finita (kelkaj ricevis deserton kaj teon, kelkaj aliaj inter kiuj mi nenion!), ni direktiĝis al la kastelo de Dovro (fr. Douvres, ang. Dover). La vetero estis tre nebula. La tutan kastelon ni eĉ ne povis vidi tra la nebul-tavoloj. Ni promenis en ĝi kaj ekster ĝi preskaŭ vagante.

15 – Finfine ni haltis en drinkejo en kiu ni drinkis anglan kafon. Sur la foto oni povas vidi Catherine Boen maldekstre kaj Xavier Dewidehem dekstre.

16 – Ni vespere rendezvous en hotelo, en kiu ni atendis longatempe kaj poste manĝis bufedajon. Tie J. Wells faris lastan paroladon, kaj dancis folkloraj dancistoj, sed bedaŭrinde, pro la vetero ni estis devigita ĉesigi manĝadon kaj reiri Francien.

17 – Foto-ludo

El la «Cap Blanc-Nez»...

Unu posttagmezon ni, okdek-anoj, decidis iri al la famaj «Cap Blanc-Nez» kaj «Cap Griz-Nez» (la blanka-nazo kaj griza-nazo kaboj).

Ĉe la «Cap Blanc-Nez» ni decidis «paŝi» malsupren laŭ la pluv-akvaj ravinetoj, kiuj estas uzata kiel padoj, kiam ne pluvas. Daniel preferis ne paŝi tie kaj elektis uzi sian aŭton.

Bernadette kaj Maryse sentime iris malsupren grand-paŝe kaj rapide.

Mi (Cyrille) kaj Françoise Lemonnier elektis singarde malsupreniri kaj lante paŝo-post-paŝo atingi la ebenajn herbejojn, helpante nin reciproke.

Bedaŭrinde, Françoise pro la ŝtonetoj de la pado glitis kaj falis surpugen. Tiam ni multe ekridis kaj Françoise, pro ridego, ne trovis eĉ momenton por paroli kaj restis muta. Koncerne min, mi trovis tempon por foti ŝin sidantan kaj ridegantan, pro tio vi malkovras ĉi tiun foton de ŝi. Mi poste helpis ŝin restarigi kaj akompanis ŝin ĝis la ebenejoj.

Jen la foto de Françoise sidanta kaj ridanta. Bonvolu, mi petas, helpu al ŝi trovi

?

17



humurajn vortojn pri la okazintaĵo, kiun ŝi travivis.

En la venonta numero mi publikigis viajn trovitaĵojn.

Komentoj, fotoj kaj ludo: Cyrille.

Tri ge-odek-anoj nun en Nederlando



Maryse, Daniel kaj Bernadette starantaj antaŭ la en irejgo de la Bulonjo teatro dum la memorfestoj Bulonjo 2005.

Maryse, Daniel kaj Bernadette decidis iri en Nederlando por paroli pri nia regiono kaj malkovri la landon kaj la morojn de genederlandanoj.

Tiun ĉi artikolon mi proponis por publikigo en la SAGO-n pri tiu vojaĝo.

En Esperanto:

En Amieno (80):

Por- kaj per-Esperanta projekto

Tri membroj de Esperanto 80, asocio en Pikardio – norda Francio –, baldaŭ iros (fine de majo kaj komence de junio) en Nederlando por turnei en diversajn klubojn kaj en la sidejon de UEA en Roterdamo. Ili pre-

zentos en amika etoso la pikardan marbordon kaj bildumojn pri Amieno laŭ 4 temoj : *urbo sur akvo, amienaj verdaĵoj, turistika urbo, la loĝ-kondiĉoj.*

Kiel subteno-signo, Regiona Konsilio senpage donis al ili video-kasedon pri prezentado de la regiono.

Ili, el la sono de tiu kasedo, tradukis la komentojn, kaj poste, kun helpo de amiena asocio pri video-teĥniko nomita «Zébulon», ili enkasedigis la esperantigitajn komentojn kune kun originalaj sonoj kaj bildoj.

Dum la vojaĝo, ili verkos taglibron pri sia vojaĝo, kiu estos uzata kiel atestilo por komuniki pri ilia sperto.

Tiu ĉi klopodo estas substrekinda, ĉar ĝi alportas al ili projekton por vivi, plu kaj pli precize lerni Esperanton per laborado kaj starigo de komunikiloj.

Traduction en Français:

À Amiens (80):

Des projets pour et par l'espéranto

Trois membres d'Espéranto 80, association en Picardie – nord de la France –, se rendront bientôt aux Pays-Bas (fin mai, début juin) pour faire une « tournée » dans divers clubs et au siège de UEA à Rotterdam. Ils présenteront dans une ambiance amicale

la côte picarde et projeteront des diapositives sur Amiens selon 4 thèmes: une ville sur l'eau, la nature à Amiens, une ville touristique et les conditions de logement. Comme signe de soutien la Conseil Régional leur a offert une cassette vidéo de présentation de la région.

Ils ont traduits et enregistrés les commentaires tirés de la bande sonore de cette cassette, et puis, avec l'aide d'une association amienne spécialisée en technique vidéo nommée «Zébulon», ils ont remasterisé ces commentaires avec avec la bande sonore originale et les images.

Pendant le voyage, ils écriront un journal de bord sur leur voyage, qui sera utilisé comme témoignage pour communiquer sur leur expérience.

Cette peine qu'ils se donnent est à souligner, car elle leur apporte un projet pour faire vivre, et plus précisément apprendre l'espéranto par le travail et l'élaboration d'outils de communication.

Cyrille
decouture.cyrille@wanadoo.fr

Dankoletero de Madis Linnamägi



Madis, vendredon la 25an de marto, dum simpozio organizita de UEA, en Bulonjo-ĉe-mar.

Karaj amikoj!

Mi turneis en la nord-okcidenta kaj meza Francio 12/03 – 09/04/2005 per la temoj «Estonio de Soveta Unio al Eŭropa Unio», «Interlingvistiko en Estonio» kaj «Esperantomovado en Estonio» (traktitaj ankaŭ kune). Atinginte hejmon aviadile (Paris-Copenhagen-Tallinn), mi frontis edukon konferencon kaj eldonadon de la artikolaro «Forselius' Tidings, 12» [Mesaĝoj de Forselius, n-ro 12, 100 paĝoj A4] de mia hejma eduka asocio B. G. Forselius-Societo.

Nun la streĉega laboro estas venke finita kaj mi dankas vin, karaj amikoj, por la superba kaj varma akcepto, gastameco kaj intereseĝaj programoj, Esperantaj kaj kulturaj. Mi povis viziti eĉ du gravajn E-centrojn, la grandiozan kastelon Gresillon kaj la ĉarman Kvinpetalo! Ofte mi diris dum mia unua turneo en 2003: «Nekredeble!» pri viaj sukcesoj en la Esperanta kampo. Ankaŭ nun mi same bonkontentis pri via agemo kaj rezultoj. Estu aparte menciata la kandidatiĝo al la Eŭropa parlamento - la sperto estas nepre evoluenda en ĉiuj 25 membro-ŝtatoj. Francio estas sendube la plej Esperanteca lando en la mondo – estado en Francio estas grava studtempo por agantoj de la Esperanta komunumo.

Inter la asociaj renkontoj okazis la pinta aranĝo de la jaro – la Bulonja kongreso okaze de la 100-jariĝo de la unua monda E-kongreso. Kiu ne revas pri Boulogne-sur-Mer, la Esperantista Mekko! Specialan dankon al Yves Nicolas (Hérouville, Normandio), lerta organizinto de la turneo kaj mia partopreno en la Bulonja kongreso, same al la E-familio Jean-Marie kaj Mary-

vonne Houvriez (Châteauroux, Indre, Le Berry), kiu brile organizis la estadon en Boulogne kaj veturon-ekskursion via Paris al Châteauroux.

Mi esperas skribi pli detale pri la vojaĝo en la Estona kaj Esperanta gazetaro, ankaŭ aparte al ĉiu gastiginta asocio/turbo, ĉar la kaleidoskopo de impresoj pri la franca E-movado kaj renkontoj, familia vivo, historio kaj arkitekturo, naturo, famega franca kuirarto, lernejoj vizitoj, tradicioj ktp., ktp. vokas al vasta respogulado. Ĉar niaj landoj situas tre malproksime, de Tallinn al Mez-Francio estas 3500 km, sekve la historio, politikaj kondiĉoj kaj la klimato draste malsimilas/is. Nun mi ĝuas duafoje ĉi-jaran printempon: en Francio jam meze de marto floris ĉerizujoj, pomujoj, floroj, kolzo (oleonapo). Baldaŭ ekfloros ili ankaŭ en Estonio, ĉi-jare escepte tre malfrue – diferenco estas 1,5 – 2 monatoj.

Madis kun Bernadette, jaŭdon la 24a de marto, dum promeno laŭ la pikarda marbordo. Tie ĉi en *Sankta-Valerio* ĉe la golfeto de la rivero *Som'*.



En la supre menciita artikolaro «Mesaĝoj de Forselius, 12» mi publicis kelkajn fotojn pri la francaj fenomenoj – Marianne kaj le Coq gaulois kiel aldonajoj al la estonigita perfekta studo de Michel Pastoureaux «Le Coq Gaulois» el «Les lieux de mémoire. III. Les France. 3. De l'archive à l'emblème» de Pierre Nora (éd., Paris, Gallimard, 1992). La koko estis dum jarcentoj sur Estona unuaklasana ABC-libro, ĝi estas same ŝatata birdo, socie kaj religie.

La hodiaŭa tago, la 8a de majo 2005, estas Patrino Tago (Tago de la Patrinoj) kaj la 9a

de majo – Eŭropa Tago (Tago de Eŭropo, laŭ Robert Schuman, 09/05/1950).

Laŭ Unuigintaj Nacioj la 8a kaj 9a majo estas tagoj de paco, toleremo kaj repaciĝo. Mi gratulas ĉiujn okaze de la Tago de Eŭropo, kiu estas venkotago super la Germana faŝismo, akirita per grandegaj streĉoj, viktimoj, perdoj... Ni agnoskas la plej grandajn meritojn de la Ruĝa Armeo por la venko, tamen la Tago fariĝis samtempe por Orient-Eŭropaj landoj tago de ekregado far la Soveta totalisma reĝimo.

Por la Baltaj landoj – Latvio, Litovio, Estonio, – la Tago fariĝis tago de la nova, Sovetunia okupacio ĝis 1991, kies krimojn nek la Rusiaj potencoj nek la landoj de la eŭropa civilizo ankoraŭ kondamnis. Pro la krimoj la prezidentoj de Litovio (Vladas Adamkus) kaj Estonio (Arnold Rüütel) ne iros la 9an de majo al Moskvo celebri la 60-jariĝon de la venko en la Dua mondmilito

(= Granda patrolanda milito en Rusio). La Latvia prezidentino Vaira Vike-Freiberga iros al Moskvo, sed ĝia saĝa politiko por klarigi la tutveran historion kaj politikon de du totalismaj ŝtatoj (Pakto de Molotov-Ribbentrop pri divido de Eŭropo, 23/08/ 1939, kaŭzinta la Duan mondmiliton) faris ĝin la plej konata kaj malamata eksterlanda persono en Rusio. Vladimir Putin parolas eĉ pri disfalo de Soveta Unio kiel pri la plej granda katastrofo de la 20a jarcento (?).

Prezidento Arnold Rüütel diris hodiaŭ: «Patrino – tio estas komenco, milito – tio estas fino». Ni protektu la valoregan pacon. Gratulojn al ĉiuj patrinoj!

Ĝis novaj renkontiĝoj en Esperantujo, en la 90a Universala Kongreso en Vilnius, en Baltio. Personan bonstaton kaj Esperantan agemon!

Amike via
Madis Linnamägi, Tartu, Estonio
08/05/2005

Mallonge – En bref

Voyage à Soissons

En français: Un voyage en car à Soissons avec la visite d'un jardin est organisé le 5 juin 2005 par l'association Cardan à laquelle les membres d'Espéranto 80 ont la possibilité de participer.

Pour participer: il vous en coûtera environ 15 € pour le car et 3 € pour le Jardin. Chacun amène son pique-nique pour le midi. Le point de départ du voyage pour visiter le château de Septmonts et le Jardin du Moulin de Quicampoix se situe le Dimanche 5 à la gare Saint Roch à Amiens à 9h15.

Daniel tra Cyrille

La Tragolfetirado 2005

En français: La Transbaie aura lieu le 19 juin. N'oubliez pas de vous y inscrire si vous souhaitez y participer.

Ci-dessous vous trouverez les contacts.

En Esperanto: Ĝi okazos la 19an de junio. Ne forgesu registrii vin je tiu ĉiu-jara evento. Por pliaj informoj: www.transbaie.com aŭ demandu Vincent Courouble:

courouble.vincent@neuf.fr

Cyrille

decouture.cyrille@wanadoo.fr

Un premier pas de l'espéranto chez France-Telecom

En français: L'espéranto aura place dans une série de conférences qui a lieu maintenant à Meylan, près de Grenoble, depuis le 30 mai jusqu'au 3 juin, dans le cadre de la «Semaine de la diversité» organisée par la Division Recherche et Développement (R&D) de France Télécom. France Télécom R&D a des centres en France, et dans diverses parties du monde. Des ingénieurs de nationalités très diverses y travaillent ensemble. Sa direction incite fortement à l'usage de l'anglais comme langue de travail entre les collaborateurs. La diffusion de l'espéranto dans ce milieu pourrait permettre la recherche d'une alternative. Pourquoi pas?

Le mercredi 1^{er} juin, de 11h45 à 12h30, le prof. Jacques Joguïn, membre du *Comité de l'Association internationale des scientifiques espérantophones*, a présenté une conférence sur l'espéranto. Jacques Joguïn est l'auteur de deux livres parus à Paris chez L'Harmattan: «Parlons espéranto» (1998) et «Lexique des termes scientifiques — mathématique, physique, informatique» (2002). La transmission de sa conférence a eu lieu avec l'université Sophia Antipolis. Toute l'affaire a commencé à l'occasion de la première conférence européenne «Télécommunications et développement durable» organisée par l'ETNO (European Telecommunications Network Operators' Asso-

ciation), qui a eu lieu à Budapest les 25 et 26 novembre derniers. Alors, dans le cadre de son intervention qui touchait les barrières à la communication et la façon dont les services de télécommunications permettent d'éliminer les distances, un intervenant de France Telecom, M. Jean-Marc Temerson, non espérantiste, signala qu'il existait toujours l'espéranto et finit même son intervention avec le mot «Dankon!» en plusieurs langues.

Par chance, il y avait dans l'assistance un adhérent de «SAT en Hispanio», Toño del Barrio, de Madrid, par lequel j'ai pu entrer en contact avec M. Temerson à qui j'ai finalement trouvé et conseillé la personne qui convenait tout à fait: M. Joguïn.

Henri Masson (texte raccourci par Cyrille)

Nova leĝpropono pri Esperanto en la itala Parlamento

En Esperanto: La kampanjo de Eŭropa Esperanto-Unio, konata ankaŭ kiel «hungaraj rajtoj-eŭropaj rajtoj», celas doni al ĉiuj civitanoj de EU-landoj la rajton, kiun havas hungaraj civitanoj, lerni Esperanton kaj esti ekzamenata pri Esperanto fine de la mez-grada lernado. Ĝi celas kaj gvidlinion de la Eŭropa Parlamento kaj leĝojn en la unuopaj landoj de EU.

Efektive nuntempe oni malpermesas al la junularo de EU formale lerni Esperanton en la lernejo, dum la gnomoj de la edukaj ministerioj kaŝe elektis sen publika diskuto difinitan lingvon, kiu iĝas deviga ĉie. Estas maldemokrate diri: neniu volas lerni Esperanton. La ekzemplo de Hungarujo, kie oni ja havas la elekton, montras, ke tamen multaj volas lerni ĝin.

En tiu kadro estis prezentita al la itala Parlamento la 10-an de marto leĝpropono, kiu nun ricevis la numeron 5714 kaj aperis en la presitaj parlamentaj dokumentoj.

Ĝin prezentis la deputitoj BARBIERI, RANIELI kaj MEREU, kaj ĝia tuta titolo estas: «Normoj pri la aliro al la studo kaj uzo de la internacia lingvo Esperanto».

La ĉefa artikolo estas la unua, kiu asertas, ke «Inter la elekteblajn fremdajn lingvojn en la ŝtataj devigaj lernejoj oni enkondukas Esperanton.»

Kompreneble nun devas okazi tuta premkampanjo je la italaj parlamentanoj por ke la propono estu efektive diskutata kaj aprobata. Eble la Universala Kongreso en Florenco en 2006 kaj la kunligitaj informlaboroj povos helpi.

*Renato Corsetti, Prezidanto de UEA
renato.corsetti@esperanto.org*

Une association espérantiste, suite à un concours, a gagné

le droit de faire de la publicité gratuite pour lernu.net, sur le moteur de recherche Google.

Reklamo pri Esperanto aperos tra Guglo [Google]

En Esperanto: Pli ol 30 000 vizitojn monate ricevas la retejo *Lernu.net*, kie eblas studi Esperanton en 24 lingvoj. Pluraj dekoj da kunlaborantoj vivigas la projekton, kiun financas la organizaĵo Esperantic Studies Foundation.

Ankaŭ tra la popularega ret-serĉilo *Guglo* [Google] baldaŭ disvastiĝos reklamo pri *Lernu.net*. Fine de marto la teamo de la retejo sukcesis gajni konkurson de *Google* pri senpaga reklamo. De tiam aktivuloj preparadis la reklam-ŝildojn kiuj aperos diversloke en la reto fine de majo aŭ komence de junio.

Legu pli en www.liberafolio.org

Une entreprise a choisi de se donner un nom en espéranto «Viareto».

Komerca firmao alprenis E-lingvan titolon

En Esperanto:

Nova TTT-aspektiga studio en Jekaterinburg alprenis E-lingvan titolon, rakontis Viktor Kulakov dum REK. La titolo estas «Viareto» (Via reto), elpensis ĝin persone la ĉefo de la firmao, ne e-isto, helpe de vortaro kaj ioma konsultado flanke de Viktor mem, kiu estas unu el la programistoj de la studio.

La studio jam registris sian domajnon: <http://viareto.ru>. Unu el la projektoj de la studio estas retpaĝo de la Rusia E-kongreso kaj EoLA, okazintaj en Jekaterinburgo.

Andrej Grigorjevskij el [e-rus-info]

9-a konferenco de la Internacia Koalicio «Por la Humanismo!»

En Esperanto:

La 1-2-an de majo en Peterburgo okazis la 9-a konferenco de la Internacia Koalicio «Por la Humanismo!»

Enkadre de la programo de la konferenco Oksana Burkina elpaŝis kun la prelego «Humanismaj tendencoj en la moderna socio. Lingvistika aspekto».

La plej grava rezulto de la prelego estis unu el oficialaj decidoj de la konferenco: «Akcepti Esperanton kiel la lingvon por internacia komunikado de la Koalicio. Establi kontaktojn kun humanistoj-espérantistoj».

Trovi informojn pri la konferenco kaj ties decidoj vi povas ĉe:

http://forhumanism.org/?target=ru/conf2005_about.html

el [esper-inform]